

El fajrero naskiĝos flamo

Al kiu apartenas tiuj vortoj el la titolo? Laŭ miaj – eble, nekompletaj – scioj al la granda rusa poeto Aleksandro Puŝkin en versaĵo, dediĉita al decembroj – ribelintoj kontraŭ la cara reĝimo komence de la 19-a jarcento. Tiujn vortojn prenis Lenin kiel moton por sia revolucia gazeto „Iskra” (Fajrero). Evidente, Lenin havis bonajn intencojn. Sed, kiel diras la rusa (eble, ne nur la rusa?) proverbo, per bonaj intencoj estas pavimita la infero. Kio do okazis en Rusio, kiam el fajrero naskiĝis flamo (ne, incendio), kaj la ŝtategon ekestris la neraremaj komunistoj?

Ĉu realo? Ĉu inkubo?

Sed la buŝon premas brido,

Kaj de supre, de belfrido,

Sekvas min mitrala tubo.

Certe dank’ al la simptomoj

Vi konjektis pri la vero:

Ni troviĝas en infero,

Sed ne estas ni fantomoj.

...

Sed la homoj ne protestas,

Kaj ne emas furiozi

Kaj ne povas eĉ supozi,

Ke infer’ ĉi tie estas.

Male, multaj opinias,

Ke ĉi tiu vivo griza

Estas vere paradiza

Kaj dankeme litanias.

Ili ĉantas al Satano

Kaj al lia rond’ diabla


Pri l’ reĝimo tre agrabla

Por la simpla inferano.

Tiujn versojn verkis Mikaelo Giŝpling. Ĉu vi konas tiun nomon? Dubinde. Kredeble, la sola eta informo pri li troveblas en la libro „Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfekta kurso de Esperanto” (p. 67). Tiom pli frape sonas la vortoj de William Auld, nia glora malkovrano de talentuloj, en la antaŭparolo al la recenzata libro: „Mi preskaŭ timas registri mian admirigon pri tiu ĉi poemaro ... jam de longe mi ne renkontis tian aŭtentikan lirikiston, tian versmajstron, kies fortaj rimoj kaj vortmuziko enkadrigas temojn vere trafajn kaj studindajn”. Ĉu multaj poetoj meritis tiel altan aprezon de la versmajstro Auld? Kio do estas tiu mistera Mikaelo Giŝpling?

Eble, la plej agrabla informo pri Mikaelo (Miĥail Jakovleviĉ) Giŝpling estas, ke li estas vivanta, do li povas plu regali nin per altkvalita poezio. Li loĝas en Moskvo nemalproksime de la moskva ŝtata universitato en modesta loĝejo kaj estas emerito. Tiu lasta fakto estas por mi ŝoka: en mia konscio li restas arda junulo, kuraĝe lanĉinta la junularan Esperanto-movadon en la post-Stalina (infera) Sovet-Unio.

Antaŭ 40 jaroj, en 1956, okazis fama (nu, laŭdire, ili ĉiuj estis famaj) 20a kongreso de KPSU (Komunista Partio de Sovet-Unio), en kiu la tiama ĝenerala sekretario Nikita Ĥruŝĉov (granda reformulo, al kiu egalas nur Mikaelo Gorbaĉov) faris sekretan raporton. La sekreta raporto (publikigita en Sovet-Unio nur post pli ol 30 jaroj) estis vaste legata en kunvenoj de komunistoj, komsomolanoj, sindikataj aktivuloj kaj ceteraj civitanoj. Eĉ mi, tiama



lernanto de la lasta klaso de meza lernejo, partoprenis (same kiel Mikaelo Giŝpling) tiaspecan legadon kaj eksciis, ke la Patro de la Popoloj, la plej amata kamarado Stalin estis krimegulo, kiu, dum pelado de la popolo al la paradizo helpe de mitraloj, enprizonigis dek milionojn kaj mortpafis milionojn da senkulpaj pelatoj (parenteze sed ne malgrave: inter ili la eliton de la sovetia esperantistaro).

Post tiu vere fama Kongreso en Sovet-Unio komenciĝis Degelo (ricevinta tiun nomon laŭ la samtitola romano de Ilja Erenburg), kiam en la paradizo, kiu evidentiĝis infero, okazis miraklaj eventoj, inter alie, en 1957 la amasega 6a tutmonda festivalo de junularo kaj studentaro, en kies kadro okazis (danke al insista premo de eksterlandaj junaj esperantistoj) sufi-

ĉe granda internacia Esperanto-renkontiĝo. Post la Festivalo (jes, kun majusklo, same kiel la menciita Kongreso) en Moskvo formiĝis la unua en la post-Stalina Sovet-Unio Esperanto-kolektivo: la junulara Esperanto-grupo, kiu akceptis la nomon ... jes, vi divenis: „Fajrero”. Tiun grupon lanĉis kaj gvidis ... jes, vi denove divenis: Mikaelo Giŝpling. Kune kun siaj samideanoj (Esperantujo konu la nomojn de siaj herooj!) Vladimiro Korĉagin, Ludmila Bokarjova (filino de Eŭgeno Bokarjov), Raisa Goldberg, Julia Sergejeva (filino de Ivano Sergejev), Nadejda Ĥoves (filino de Isaako Ĥoves), Leo Vulfoviĉ (la sola, kiu dum 40 jaroj restis aktiva movadano), Vera Zlotnikova, Vladimiro Priŝekin, Maja Glovinskaja kaj aliaj, Mikaelo organizis entuziasman kaj sagacan agadon en Moskvo kun laŭebla helpo al la provinco. El „Fajrero” naskiĝis se ne flamo, do almenaŭ flameto da organizita Esperanto-movado.

Mi lernis Esperanton memstare en 1957 per libreto eldonita por la Festivalo en la fantasta kvanto de 95 000 (jes, naŭdek kvin mil) ekzempleroj kaj korespondis kun kelkaj Fajreranoj. Kiam en 1959 mi venis unuafoje en Moskvon voje al mia unua Esperantotendaro en Estonio, mi ne trovis „Fajrero”-n: ĝi malaperis kune kun la pliparto de siaj aktivuloj pro ne tute klaraj kaŭzoj – internaj konfliktoj kaj eksteraj cirkonstancoj, en kiuj, onidire, ne la lastan rolon ludis la sekreta polico KGB, heredinto de la fifamaj NKVD kaj MGB.

Ĉar en mia longa Esperanto-vivo mi subtenis kontaktojn kun centoj da esperantistoj enlande, inkluzive multegajn eksaktivulojn, en 1971 mi sukcesis trovi la misterajn Mikaelon Giŝpling kaj Vladimiron Korĉagin, invitis ilin al mia hotelo por konversacii kaj akompanis al kunveno de Moskva Esperanto-klubo. Kaj la klubanoj aŝis, ne kredante siajn okulojn, kiam ni eniris la salonon.

Dum jaroj mi renkontadis la reaktiviĝintan Vladimiron Korĉagin, sed ne la denove malaperintan Mikaelon. Intertempe en la landon venis perestrojko, en 1989 ni forĵetis la altruditajn kuratorojn de ASE (Asocio de sovetiaj esperantistoj) kaj restarigis la memstaran SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio). Baldaŭ post tio mi sidis en la kabineto de Vladimiro Samodaj (kiu estis la unua persono, kun kiu mi parolis en Esperanto, en la malproksima 1959 en Odeso), redaktoro de la gazeto *Moskvaj novaĵoj* kaj la ĵus elektita unua prezidanto de la

restarigita SEU (mi estis elektita vic-prezidanto). Subite oni anoncis vizitanton, kiu legis, ke *Moskvaj novaĵoj*, eble, aperos en Esperanto. Li modeste prezentis sin: „Mikaelo Giŝpling”. Al Vladimiro tiu nomo diris nenion. Sed mi vokis lin deflanke: „Saluton, Miĉjo! Mi estas Boris Kolker. Ĉu vi rekonas min?”. Li ĝoje rekonis. Kaj komenciĝis vigla konversacio en Esperanto. Poste mi vizitis la gastaman hejmon de Mikaelo. Li regalis min ne nur per plej fajnaj vinoj, konjako kaj manĝaĵoj, sed ankaŭ per siaj manuskriptaj versaĵoj. Mi aŭskultis kaj miris, konsciante, ke mi aŭskultas maturan poeton. Poste Mikaelo partoprenis en agado de Moskva literatura Esperanto-klubo (MLEK), kiun gvidis Vladimiro Samodaj. De tempo al tempo ni kontaktis letere aŭ telefone. Mikaelo kaj lia edzino ĉiam invitadis min kaj mian edzinon al sia hejmo.

En 1993 ni forlasis Rusion kaj transloĝiĝis en Usonon. Kaj jen nova agrabla renkontiĝo kun Mikaelo, pli ĝuste kun lia brila poezia libro. Kiel fartas la poeto en tiu multsufera (sed interese kaj magnete altira) lando?

Ni estas iu speciala gent'
Simile al kobajoj aŭ kunikloj,
Bredata sole por eksperiment'
Kaj tre rezista al sociaj tikloj.

...

Do vi demandas: kiel fartas ni?
Sufiĉe bone – kiel fiŝ' dum farĉo,
Ni sidas nun en mez' de iu marĉo,
Liberiĝinte de la tirani'.

Kaj mi ne scias, kiam el la kot'
Elrampos ni kaj marŝos sur asfaltoj.
Ni ĉiam venkas flakon per du saltoj –
Ĉu al vi plaĉas tiu ĉi metod'?

Tamen la nekorektebla revulo ne
perdas optimismon kaj plu esperas,
ke la fajrero de demokratio transformos
Rusion en feliĉan landon:

Ĝis nun ne estingiĝis la esper',
Ke malfermiĝos antaŭ ni Sesamo
[Sezamo]...
Ĝi estas ne pli granda ol fajrer',
Sed el fajrero ja naskiĝas flamo.

Kiam mi legas versojn de Mikaelo
Giŝpling, al mi ŝajnas, ke mi aŭdas jen
martelantajn versojn de Aleksandr
Blok:

La fremdaj urboj... Ĉu mi ree vagas
Gvidata de hazardo kaj instinkt'
Dum nokto en la stranga labirint'
De stratoj, kiuj kurbas kaj zigzagas
Kaj vokas min al tiu ĉi promen'?
La nokta urbo sen kutima svarmo

Min ĉirkaŭvolvas per mistera ĉarmo
Kaj akompanas min ĝis la maten'.

Jen sentemajn versojn de Sergej
Jesenin:

Forbrulis la somera arda sun',
En la animo restiginte cindron...
Kaj mi atendas, kiam la aŭtun'
Subite transformiĝos en la vintron.

Dum unu nokto la unua frost'
Rivelos la blank-nigran negativon –
La neĝa tero kaj la sombra bosk'
Kun norda vent' eniros nian vivon.

Ho, kiel bele sur la blanka fon'
La branĉoj plektas nigran fajnan punton!
Finiĝas la vesper' kaj la sezon' –
La vintro metos sian finan punkton.
aŭ mi vidas abundajn apetitigajn
manĝaĵojn sur pentraĵoj de flandraj
pentristoj:

Mi ŝatas vagi inter la vendvicoj
Kaj ĉe l' braĝuoj sur zumanta plac' –
Viand' rostiĝas, bonodoras spicoj
Kaj naĝas grasaj nuboj de haladz'.
El fendiĝintaj korpoj de granatoj
Pogute fluas sanga karmezin'
Kaj korboj de paprikoj kaj tomatoj
Per sia ruĝa lako logas min.

Malgraŭ tiuj similaĵoj, Mikaelo Giŝ-
pling estas poeto memstara, de neni-
u dependa. Lia temaro estas vasta, li
facile transiras de liriko al akre sociaj
temoj; li estas ne nur poeto sed ankaŭ
kuraĝa civitano; kaj lia voĉo ne falsas.
Liaj bildoj estas netrivialaj kaj impresaj.
Liaj puraj ritmoj kaj rimoj kreas
admirindan harmonion. Liaj sonetoj
fluas tute nature, sed ne elturmentite,
kiel ofte tio okazas. Lia lingvaĵo estas
ege riĉa, tamen la uzataj de li neolog-
ismoj ne agacas, sed instigas esplori
en vortaroj. Kaj laste sed ne balaste, li
estas homo gaja kaj memkritika, am-
anta Esperanton kaj virtuoze reganta
ĝin:

Mis... La prefikso diras pri eraroj.
Obsedas nin misagoj kaj misfaroj.
Dum mia viv' mi ofte miskondutis,
Mispaŝis, misakuzis, missalutis,
Misskribis, miskorektis, misproklamis,
Miskisis, mispromenis kaj misamis.
La vivon mi misuzis kaj eltrivis –
Do mi neniam vivis, sed misvivis.
Amikoj, tamen antaŭ nia diso,
Por ke ne estu ĝi definitiva,
Mi revas pri ankoraŭ unu „miso”:
Se mi mismortos, do mi restos viva!
Boris KOLKER

Mikaelo Giŝpling: *El sisma zono*. Eld.:
Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1994.
Serio Stafeto n-ro 19. 110 p. ISBN: 90-
71205-56-8. Prezo 300 BEF.

Historio de la volapuka movado

Johann Martin Schleyer (1831-1912) aperigis en 1879 sian lingvo-projekton Volapuko (*Volapük*, 'mond-lingvo'). Okdek tri jarojn poste Johann Schmidt publikigis historion pri ties movado. Nun André Cherpillod eldonis tiun libron en Esperanto, tradukitan de Philippe Combot. Per tiu traduko ni povas do konatiĝi kun la organizaĵoj de tiu fascina antaŭulo de Esperanto. (Vidu recenzon pri la gramatiko de Volapuko en MONATO, septembro 1995, p. 23.)

La libro estas organizita laŭtempe, en ĉapitroj, kiuj prezentas la nomojn de la kluboj kaj revuoj (tamen sen traduko). Tiel ni povas por ĉiu jaro vidi, kiom da kluboj kaj kiom da revuoj ekzistis. Nur en 1889 ne malpli ol 40 kluboj estis fonditaj. Sed jam en 1891 la movado estis en stato de atendado: oni parolis pri kvar partioj inter la volapukistoj, sed verdire du volis krei tute aliajn lingvojn kaj tiel ne plu apartenis al la volapuka movado. Pri tia disfalo oni kompreneble scivolas.

La sorto de la lingvo ĉefe dependis de du viroj, Schleyer kaj August Kerckhoffs (1835-1903 aŭ 1905), *datuval*, 'inventinta moŝto' respektive *kademal*, 'akademia moŝto' aŭ *dilekel*, 'direktoro' de la *kadem*, 'akademio'. Estiĝis malamikeco inter la du, kaj Kerckhoffs ekŝiĝis el la akademio. La libreto donas mallongajn specimenojn de la origina Volapuko, la Volapuko de Kerckhoffs kaj la „nuna” Volapuko, t.e. tiu de Arie de Jong. Tamen mi kiel leganto soifas pri informoj rilate al la personaj kaj lingvaj flankoj de la disputo.

La libreto estas provizita per pluraj indeksoj: pri nomoj, gazetoj, libroj kaj lingvoj.
Christer KISELMAN

Johann Schmidt: *Historio de la universala lingvo Volapuko*. Tradukis el la volapuka originalo Philippe Combot. Eldonis André Cherpillod, Cougenard, 1996. 30 + XXII p. ISBN 2-906134-30-9. Prezo: 270 BEF.

Ĉiuj Esperanto-libroj estas akireblaj ĉe la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo. Se vi estas „privilegia kliento” – tio estas, se via konto ĉe FEL enhavas 2000 BEF aŭ pli en la momento de la mendo – vi ne pagos la afrankon. Kompletan aktualan libroliston vi trovos en Interreto je <http://www.knooppunt.be/fel/stoko.html>. Liston kun novaĵoj vi trovos je http://www.knooppunt.be/fel/nov_lib.html.